

# ELNA NEWSLETTER

## NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Published by the Esperanto League for North America. March-April 1974.  
Editor: Charles R. L. Power. Editorial Committee: Robert Bailey, Margaret Hagler, Dorothy Holland, Jonathan Pool. Includes section in Esperanto, Bulteno, sent to ELNA members only.

### *International Friendship Week Celebrations*

This year, the Central Office has received a record number of proclamations of International Friendship Week, an annual celebration of human brotherhood launched by the World Esperanto Association in 1969. Two governors, a sheriff and nine mayors have contributed, as follows: from California, Mayor Peter J. Coniglio of Monterey, Mayor Robert A. Quinn of Pacific Grove, Mayor Joseph L. Alioto of the City and County of San Francisco, and Mayor Floyd E. Welch of San Mateo; from Massachusetts, Governor Francis W. Sargent, Sheriff John D. Courtney, Jr., of Berkshire County, Mayor Kevin H. White of Boston, and Mayor Evan S. Dobbelle of Pittsfield; from Oregon, Mayor Neil Goldschmidt of Portland; from the State of Washington, Governor Daniel J. Evans, Mayor David H. Rodgers of Spokane, and Mayor Arlo A. James of Walla Walla.

As usual, Walla Walla trailed only alphabetically; its handling of the occasion could serve as a model for us all. We quote in full a short newspaper article describing activities there:

"Local Esperantists celebrated International Friendship Week, the last full week in February, with a potluck supper Wednesday at the Garden Center.

"Effiong Akpan, a native Nigerian, spoke about conditions in his homeland. The Whitman College student said that Nigeria has 14 tribes, each of which speaks a completely different language. He credited the present peace in his



Mayor Neil Goldschmidt (center) of Portland hands over proclamation of International Friendship Week to Laurin F. Lewis (right) while members of the Esperanto Club of Portland State University look on.

country to the establishment of 12 states which are based on language groups.

"Akpan became interested in Esperanto at a class during the recent Whitman interim, he said.

"Friendship poems written by Esperantists in other lands were read by Sara Ann Estling and Dan Wood. Dr. Quentin Schwenke read proclamations from Gov. Daniel J. Evans and Walla Walla Mayor Arlo James in regard to International Friendship Week.

"Schwenke announced that the American Association of Teachers of Esperanto had notified Vincent Broman that he had passed his advanced examination 'with distinction'. Broman, a Whitman student, learned Esperanto by self-study."

If your mayor, sheriff, governor or other official has made a proclamation of International Friendship Week, please send a xerox to the Central Office. If you are not keeping the original, please send it to the Archivist of ELNA (see p. E-8 of the Esperanto section).

## Casualties of Babel

On 20 February 1974, R. Kent Jones addressed the students of Willowbrook High School, Villa Park, Illinois, on Esperanto. He gave examples of the world language problem which bear repeating:

The story of the "Pink Death" in Iraq is reported in the November 1973 Reader's Digest. Wheat intended for seed purposes was treated with a pink insecticide, and each bag carried a warning message. Nevertheless the hungry people ate the poisoned wheat, with the result that 6000 died and 100,000 were crippled. Why? The warnings were written in Spanish, a language almost unknown in Iraq.

According to the Wall Street Journal (25 January 1974), a major international project is being slowed by translation delays. Design engineering work is being performed at the Swindell-Dressler Company for a giant truck factory to be built in Russia. After two years of daily contact, eleven interpreters are still needed for explanations to the Russian workers.

During a symphony in Chicago, the German conductor collapsed. He was rushed to the hospital, but treatment was delayed for an hour until an interpreter could be found. He could have died in the meantime.

An oil tanker crashed into a bridge and caught fire in Louisiana. Firemen raced to the scene, but could learn nothing about whether people were trapped below deck. Why? Because the Korean crew couldn't understand English, and the firemen couldn't understand Korean.

In 1967 an important diplomatic message from Ho Chi Minh was received by the State Department in Washington. There the translation was bungled by thinking that the French verb "demander" was an arrogant demand, instead of an ordinary question. The request was angrily rejected, and the war went on to kill and injure people by the thousands.

The multiplicity of languages at the United Nations is a major source of frustration and cost. In fact, at \$23 million per year, it almost uses up the total contribution of the #2 contributor, the Soviet Union (\$26 million/year). The Chinese and Arabs insist that their languages be given equal status with English and French.

Full-scale language riots occurred in India in the late 1940's, when decisions

were needed about the language policy and usage of the new government. People were killed and injured because each minority wanted its language to be dominant. India now has fourteen official languages, and remains so divided that ordinary commerce as we know it scarcely exists inside the country.

Unrest is growing in the U. S., due to minorities who are dissatisfied with the unequal language situation. There is no statute law, only custom, which makes English dominant at this time. The large Spanish-speaking minority in the U. S. (2.4 million students) has been seeking bilingual education for the last several years. The Chinese in San Francisco recently gained a decision by the U. S. Supreme Court that every child must be taught in the language he can understand. Since there are more than forty sizeable minorities in the U. S., just try to imagine the difficulties this will add to school administration!

Mr. Jones concluded his listing of language breakdowns with the words, "The list continues, but I will stop with noting the problems of education for children of migrant European laborers (mentioned in Fortune magazine), and accommodation of a torrent of visitors to the linguistically unprepared U. S. during the 1976 Bicentennial celebrations. The conclusion from these language-based problems is, I think, inescapable: Unless one approves of occasional catastrophes and continual costs and social friction, he is logically compelled to help end language confusion."

## Translation into French

The West's most widely circulated French-language newspaper, Le Californien (biweekly), has published a serialization of J. L. Mahé's story "Gemeliço", which originally appeared in Monda Kulturo, autumn 1964. The translation, "Jumelage", appeared in the issues 31 December 1973 through 12 February 1974.

The story is a bit of black humor concerning an attempt by the directors of the Eiffel Tower and the Golden Gate Bridge to prevent their respective trusts from being used to commit suicide. This eventually becomes a bitter rivalry to see which monument can accumulate the most victims.

## Review

International Business Dictionary in nine languages/Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj. Planned, compiled and edited by F. Munniksmā, under the auspices of Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio (EKI). Kluwer. Deventer (Netherlands), 1974. xvi + 535p., hardbound. ISBN 90 267 0394 5. \$27.50 (\$25.00 to ELNA members) postpaid, from ELNA Book Service, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010.

No matter how experienced an Esperantist might be, or for that matter any speaker of a second language, there are always problems in specialist vocabulary, where a group of words often has a meaning greater than the sum of its parts. One specialty in which virtually anyone could use some expertise is business. Could you, dear reader, give me the Esperanto equivalents of the terms bank overdraft, cover note, to fall due, estate in intestacy, nominal rate, share option, trust deed? Well, you need no longer find yourself at a loss for words in discussing such matters. This dictionary delivers translations into Esperanto, German, Spanish, French, Italian, Dutch, Portuguese, and Swedish for almost three thousand English terms.

We of the English-speaking community are particularly lucky, because, although it was compiled through Esperanto, the dictionary is alphabetized by the English translations. The definition of each term appears in English and Esperanto. Complete indexes, referenced by the number of each article, are provided in Esperanto and the seven languages for which only translations (without definitions) are provided. Altogether, the volume is an excellent buy for any businessman with contacts abroad.

Those interested in an extensive lexicographical analysis are referred to the review in Esperanto, May 1974, by Dr. John C. Wells. His remarks are quite accurate as far as they go, but he understandably neglects one possible

source of discontent this side of the Atlantic, i. e., the fact that the English here is for the most part of the British variety, although a few specifically American variants are included. Don't translate social security by sociala sekureco before reading the definition, which makes it clear that the notion in question is what we call welfare. You want the term under social insurance, to wit, sociala asekuro.

Of course, everyone will find a few terms missing. Among those conspicuously absent to this reviewer are per capita, laissez-faire and infant industries. There is no question, though, that this is the most inclusive dictionary of its kind available for Esperanto.

Altogether, heartily recommended!

## Esperanto for the Blind

Correspondence courses on three levels (beginning, intermediate, and advanced) are available without charge to blind people through the Hadley School for the Blind.

Anyone in the world who is legally blind and can read Grade 2 English braille can enroll in Esperanto 1 and Esperanto 2; Esperanto 3, which is conducted entirely in the international language, is open to anyone who can write a braille letter in acceptable Esperanto.

The student need provide only braille paper and writing equipment. Braille textbooks, exercises, dictionaries, supplementary reading, and pronunciation tapes are provided by the Hadley School. Each pupil works at his or her own speed, but is expected to send in at least one lesson a month.

Application forms may be requested from the Hadley School for the Blind, 700 Elm Street, Winnetka, IL 60093. Additional information can be furnished in braille or print by the instructor, Mrs. Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara, CA 93111.

ELNA, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010

Please enroll me in the Esperanto League for North America. I enclose \$10 annual dues.  New membership  Renewal

I am enclosing a tax-deductible contribution to ELNA in the amount of \$\_\_\_\_\_.

NAME \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY \_\_\_\_\_ STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

The Esperanto League for North America is a non-profit organization dedicated to spreading the use of Esperanto, the international language, and thereby advancing friendly relations among all the peoples of the world. Members receive a bimonthly Newsletter and an annual anthology of original Esperanto works. New members get bonus international Esperanto newspaper Heroldo (\$10 value, 18/year). All donations are tax-deductible. Information on bequests and gifts of stock or bonds will be provided upon request.



William Auld, returning to SFSU for fifth consecutive year (see p. 1).

## NEW GENERAL CATALOGUE TO APPEAR

Regular customers of ELNA's book service should be overjoyed that they will soon be able to throw out the several dozen supplements to the old twenty-page booklist which appeared several years ago. At last a full catalogue of all literature will be available with up-to-date prices, covering both original and translated works, from novels, poetry and short stories to essays, scientific treatises and handbooks. This catalogue, which will include descriptions of most items, will be sent without charge to all members. It will be available to the general public for \$1.00.

ELNA's book service is among the finest in the world today, and is certainly the most comprehensive in this hemisphere. It can stay that way only if the membership utilizes it. Not only do book orders support the

**ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA**  
P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010  
Usono/USA



NEWS PLEASE EXPEDITE

League financially, but they mean that the Esperantists in this country are raising their consciousness of the cultural value of the language itself, and thus becoming better equipped to advance and defend it. So keep your book service busy!



## LATIN CLASS WINS WITH ESPERANTO

The Olympian Council, Latin club of Circleville High School, Ohio, won the prize for Most Outstanding and Original Foreign Language Performance at the Foreign Language Festival of Otterbein College on 27 April. However, they put on not a Latin, but an Esperanto playlet: "Tri ursoj" (Three Bears), from the juvenile play collection Bonvolu esti mia amiko by Ella Gibson (75¢ from ELNA Book Service). It seems they all learned the modern as well as the ancient international language in Mrs. Winnifred Breegle's class of Advanced Latin.

Shown above, from left to right: Sandra Rector, Olympian Council President John Dowler, Beth Bushee, Cheryl Brian, Terry Chelikowsky, Libby Goeller, and the proud Mrs. Breegle.

Nonprofit Organization  
U.S. POSTAGE  
**PAID**

Burlingame, CA  
Permit No. 296

Address Correction Requested  
Return Postage Guaranteed

## PRESKOBOLDO PETOLAS

En la lasta numero aperis aliĝilo por loĝado ĉe la ELNA-Kongreso en Spokane, kun la datoj "21-23 July 1974." Bonvolu tuj noti, ke tiuj datoj devus esti "21-23 June 1974."

Vi eble jam ricevis orkoloran aliĝilon kun la financkampanja letero. Bonvolu uzi tiun aliĝilon por la Kongreso, kaj konsci, ke la bonveniga komitato ne pretas respondecigi pri samideanoj, kiuj venos en julio!

## Infankonkurso pri Pollando

Wojewódzki Dom Kultury (Vojevodia Kultur-Domo) en Bydgoszcz, Pollando, organizas konkurson pri infana kreado en la sferoj de desegno, grafiko kaj arta eltondado. La konkurson rajtas partopreni infanoj en la aĝo de 5 ĝis 13 jaroj. La alsendotaj laboraĵoj—en la kvanto de 1 ĝis 3—povas trakti diversajn problemojn ligitajn kun la nuntempa Pollando, kiel ekz. industrio, pejzaĝo, kulturo, grandaj poloj.


La alsendotaj laboraĵoj devas enspacigi en la dimensioj de 50 x 70 cm. Sur la inversa flanko de la farita laboraĵo konkursa oni devas skribi la nomon, aĝon kaj adreson de la aŭtoro.

Sendepende de la atribuotaj premioj, ĉiu partoprenanto ricevos konkurso-memor-plakajeton. La premiitajn konkursaĵojn oni montros en speciala ekspozicio, aranĝota en Bydgoszcz en julio 1974.

Kaj nun—**ATENTON!** La ĉefa premio en la konkurso estas 10-taga restado en Pollando por la venkinto kaj ties protektanto (kune kun la pagitaj vojaĝkostoj). Krom tio, la ĵurio aljuĝos entute 200 premiojn pro la plej bonaj laboraĵoj en ĉiu grupo de aĝo kaj tekniko de plenumo.

Ĉiuj alsendotaj laboraĵoj fariĝos proprieto de Galeria i Ośrodek Twórczości Plastycznej Dziecka (Galerio kaj Centrejo de la Plastica Kreado de la Infano) en Toruń, la naskiĝurbo de la granda pola astronomo Mikołaj Kopernik.

La konkursaĵojn oni devas sendi ĝis la 31a de majo 1974 al Wojewódzki Dom Kultury, 85-023 Bydgoszcz, ul. Toruńska 3, Pollando.



Jen Miss Spokane, kiu nin bonvenigos al la 22a Kongreso de ELNA (vd. p. 3 de la anglalingva sekcio).

## Pasio en Filadelfio

Esperanto instruigas en Filadelfio! (Pensilvanio, ne Malgrand-Azio.) Ekzistas tie publika Magneta Mezlernejo por Fremdlingva Studo, kiu sabate kaj dumsemajne prezentas senpagajn kursojn en 17 lingvoj al ĉirkaŭ 300 personoj diverstipaj. Ekde ĉi tiu pasinta aŭtuno, oni ankaŭ havas tie Esperanto-kurson.

La dek du plenaĝaj kursanoj rapide progresas, uzante Esperanto: A New Approach de Auld, Ni Parolu Esperanton de Markarian, kaj adaptitajn filmstriojn el franclingva kurso. La instruisto, s-ro Joseph Conroy, opinias, ke la lernantoj de Esperanto havas pli multan sukceson ol tiuj, kiuj aliajn, malmodernajn naciajn lingvojn studas. Nursabata kunveno neniam sufiĉas por lernado de nacia lingvo, sed sufiĉas vere por Esperanto.

Ekzistas ankaŭ kurso por mezlernejoj ĉe Lincoln Mezlernejo, kiu altiras kelkajn kapablajn lernantojn.

Ĉiu Filadelfiano aŭ filadelfia ĉirkaŭaĵano estas kore invitata viziti la lernejon por iomete konversadi kun la klasanoj. Plue, kuketojn kaj kafon oni ofte havas ankaŭ por vizitantoj. Sabataj klasoj troviĝas ĉe South Philadelphia High School, Broad Street kaj Snyder Avenue.

## Letero al la Redakcio

De A. M. Brya, Urbana, IL

La tri Leteroj al la Redakcio presitaj sur p. E-4 de via lasta numero multe placis min. Ili ĉiuj estis tute kompreneblaj kaj bonstile verkitaĵoj. Legi ilin kuraĝigis min sufiĉe ke mi decidis mem elverki leteron por tiu paĝo. La temo de mia letero estas voĉlegado aŭ parolado de Esperanto.

La akirado de la plej komprenebleca kaj flueca maniero de parolado estas pli simpla afero ol oni povus supozi se oni ne antaŭe havus la solvon. Tiun sekreton mi senkovrigis post multe da ĉiutagaj enuigaj ekzercoj. La solvon de tiu duobla afero oni povas eltrovi por si mem, tiel: koncentru la atenton nur al la unua silabo de ĉiu vorto, kaj lasu, ke la resto de la vorto venu per si mem. Ne pensu pri prononcado tra la tuta vorto, ĉar la menso ne povas funkciadi sufiĉe rapide por tio; nur pri la unua silabo, de ĉiu vorto, devas oni pripensi.

Se vi ekzercados vin en la dirita maniero, vi atingos fluecon en la unua momento de legado. Ne estu tima, ke vi rajdadas la unuan silabon tro longe; ju pli longe oni rajdas ĝin, des pli komprenebla oni fariĝas.

Mi forte konvinkiĝis ke la voĉlegado de Zamenhofaj verkoj estas la plej rekta kaj praktika metodo por lerni la lingvon. La instruanto povas helpi la lernantojn pri la prononcado de la literoj de la alfabeto, sed pli ol tion, la ĝustan sondadon de la silaboj, la instruanto ne povas multe doni. La konstruadon de la frazoj kaj la pens-manieron de la lingvo la lernantoj povas akiri nur de la aŭtoro de la lingvo; per la praktika rutino de voĉlegado de liaj verkoj.

Kiam ni havos multajn kompetentajn voĉlegantojn de Zamenhof, tiam ni povos lerni la spiriton kaj la pens-manieron de la lingvo per la facila rimedo de aŭskultado.

## Rezoluĉioj

Ĉiuj rezoluĉioj proponataj al la 22a Kongreso de ELNA devas esti ricevitaj plej malfrue la unuan de junio 1974. Sendu ilin al la Prezidanto de nia Ligo, d-ro E. James Lieberman, 6451 Barnaby Street N. W., Washington, DC 20015.

## Himno kantita en Esperanto

Je instigo de ELNA-kasistino Peggy Linker, la Unua Kongregacia Preĝejo de Walla Walla, Vaŝingtonio, kantigis sian ĉeestantaron en la internacia lingvo, dimanĉe, la 17an de marto.

Post prelegeto fare de s-ino Linker pri la interna ideo kaj ĝusta prononcado, ĉiuj kantis la esperantan himnon "Matene vekigante". Oni disdonis foliojn kun la teksto kaj ĝia angla traduko, kiun faris kvin lernantoj de Esperanto instruataj de s-ino Linker. Tiu himno trovigas, kun multaj aliaj, en la libro Adoru kantante (\$4,75), havebla ĉe nia Libroservo.

La pastro petis, ke tia evento okazu ankoraŭfoje en la proksima estonteco.

## Eksperimento en Kolombio

3 120 infanoj en Kolombio havas aktuale la eblecon evolui kiel kleraj plenaĝuloj laŭ la plena signifo de la vorto "klera": liberaj de antaŭjuĝoj kaj tabuoj, kapablaj naski kaj eduki la nombron da infanoj deziritan de si, kaj konsciaj pri sia rolo en la formado de siaj propraj vivoj kaj tiuj de venontaj generacioj, kiam ili akceptos plenan partoprenon en la evoluo de sia lando.

3 120 ne estas multaj, oni povus diri, el dek milionoj da infanoj malpli ol 15-jaraj, kiuj konsistigas duonon de la aktuala loĝantaro de Kolombio. Tamen, jen komenciĝo, kaj se sukcesos la eksperimento, kiun nun faras la Ministerio pri Eduko pere de la Universitato de Studoj pri Loĝantaro (de la Universidad de la Valle), kun teknika helpo de UNESKO kaj financa de "UNFP" (Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Priloĝantara Agado), aliaj miloj da infanoj ricevos en venontaj jaroj saman enkondukon en la vivon. Post ne longe, ĉi tiu nova speco de instruo, kiu kombinas seksedukon kaj studon pri problemoj de la loĝantaro kaj medio kun tiu de la kutimaj temoj—naturaj sciencoj, biologio, geografio, hispana lingvo, religio kaj civitismo, povos ricevi ampleksigon ĝis la tuta kolombia eduk-sistemo.

La celo de la eksperimento estas evoluigi en la infanoj, de la unuagrada lernejo supren, la konscion, kiel la konduto de la individuo havas sociajn kaj mediajn sekvojn rilate al la kresko de la loĝantaro.

(Unesko-Novajoj, UEA)



## LASTMOMENTE EL OHIO

La 5a Ohia Esperanto-Kongreso pretiĝas. La dato estas sabato, la 4a de majo 1974, kaj la loko Holiday Inn norde de Columbus, Ohio. Ĝi daŭros de la 10a ĝis la 16a horo. Gastpreleganto estos la Prezidanto de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, d-ro John Lewine. Se vi interesiĝas, senprokraste skribu al Esperanto Library, 208 E. State Street, Columbus, OH 43215.

## Diverse....

En Iovao, L. A. Ware aperigis artikolon pri Esperanto ("A New Hobby for Grown-Up Guys") en regiona revuo por emeritoj, Involvement.

En Anaheim, Kalifornio, ekspozicio pri la internacia lingvo okazis en kadro de la Kalifornia Socistuda Konferenco en marto. Deĵoris Bernice Garrett, Brian N. Burg kaj ges-roj Francis E. Helmuth.

Ĉe la lernejo La Entrada en Menlo Park, Kalifornio, gelernantoj en la klaso de s-ino Mary D'Anna kunmetis kajeron pri dek du fremdaj lingvoj. Ĉiu sekcio havis skizan historion de la koncerna lingvo kaj kelkajn utilajn frazojn. La sekcion pri Esperanto verkis f-ino Cindy Perry.

En Lawrence, Kansaso, Thomas E. Boyd faris bibliotekan ekspozicion okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

Televida stacio WETA en Vaŝingtono, Kolumbio, surondigis programon pri la internacia lingvo la 21an de januaro. Ĝin partoprenis Thomas Goldman, E. James Lieberman, William Solzbacher, Sergio Docal, Peter Benson, kaj Jim kaj Pat Curlin.

Dank' al efika klopodado de Gerald Cirrincione, la urba biblioteko de Boston, Masaŭuseco, lastatempe aĉetis de nia libroservo pli ol cent volumojn de literaturo en Esperanto. Ni esperas, ke la loka samideanaro ekspluatos sian bonan ŝancon per ofta elpruntado!

Hebrelingva revuo La Miŝpaĥa en Nov-Jorko presigis artikolon pri d-ro L. L. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto, en sia marta numero.

Bibliotekisto ĉe Pensilvania Ŝtata Kolegio, Cornelius McKown, respondecas konstantan ekspozicion pri Esperanto en Schlow Memorial Library.

## Interlingvistiko—redifinenda?

La Seminario pri Interlingvistiko por 1974 okazos dum la 89a Jarkunveno de la Asocio por Nuntempaj Lingvoj (MLA) en Nov-Jorko, de la 27a ĝis la 30a de decembro.

Prof. Julius Balbin, estro de la seminario, proponis kiel ĉeftemon de diskuto la redifinadon de la termino mem, unue uzita de Jespersen en 1931. Tion necesigas diversaj eventoj de la lastaj du jardekoj, plej grave la daŭre kreskanta bezono por neŭtrala, facile ellernebla lingvo por internaciaj kulturaj rilatoj, politikaj kaj diplomaciaj aferoj, komerco kaj turismo, kaj la preskaŭa formorto de ĉiuj movadetoj por iu aŭ alia projekto de internacia lingvo, ekz. Basic English kaj Interlingua, kontraste kun la rimarkinde plifortigita pozicio kaj prestiĝo de Esperanto kiu, de nura projekto elpensita de d-ro Zamenhof, jam evoluis al vivanta lingvo kun vera komunumo. Tiu disa komunumo havas siajn proprajn tradiciojn, valorojn, ideologion kaj belartan literaturon, kiu eltenus komparon kun multaj naciaj.

## Ĉefdelegito forestos

Armin Doneis, Ĉefdelegito de Usono, intencas por la unua fojo dum multaj jaroj partopreni la internacian movadon per vojaĝo al Eŭropo kaj ĉeesto de Universala Kongreso. Sekve, de la unua de junio ĝis la 20a de aŭgusto 1974, Usono estos sen ĉefdelegito.

Se iu dum tiu preskaŭ tri-monata tempospaco havos urgajn aferojn rilatajn al UEA aŭ la Universala Kongreso, tiu bonvolu trakti senpere kun la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

## Ni petas fotojn!

La redaktoro daŭre provas plivigli la aspekton de ELNA Newsletter, jen per pli videblaj titoloj, jen per fotoj. Sed li ne povas mem provizi fotojn de la tuta usona movado. Li petas do, ke oni sendu al li interesajn nigre-blankajn fotojn de kunvenoj, ekspozicioj kaj aliaj eventoj.

E-4

## Recenzo

De Karl Pov

Ŝercoj, rakontoj. Red. Vilmos Benczik. Tankönyvkiadó. Budapest, 1972. 105p. \$0,50.

Ĉi tiu libreto estas tute modesta: laŭ titolo, laŭ formato, eĉ, bonŝance, laŭ prezo. La titolo estas, tamen, ne tre bona indiko de la enhavo. Ĝi certe kapablas forpeli eventualajn legontojn, ĉar la anekdotara ĝenro havas fiodoran reputacion en Esperantujo, kiun, cetere, ĝi tute meritas de post la Fundamenta Krestomatio. La fulmorapide elĉerpita Kruko kaj Baniko larĝe fendis la tradicion, sed jam reŝtopis ĝin Bonhumora Injektilo kaj Amuzaj Dialogoj.

Sed la nuna libreto, malgraŭ sia titolo, ne estas nur aŭ eĉ ĉefe anekdotaro. Ĝi ja inkluzivas dek ŝercojn, ne malbonajn, el kiuj ses estas historiaj, du el tiuj el la Movado mem. Sed oni trovas ankau fabelojn, novelojn kaj poemojn.

Precipe la noveloj povus prezenti bonegan enkondukon al nia literaturo, kiel garantias la aŭtoraj nomoj ĉe la originalaĵoj: Baghy, Bóti, Rosbach, Szathmári, Ueyama kaj Szilágyi. La tri tradukaĵoj estas indaj akompanantoj.

El la kvar poemoj, tri estas originalaj, ĉiuj jam aperintaj en la Antologio. La longa, tre amuza "Foirfesta kanto pri Esperanto-instruisto" de Pumpr, se ne ĝuste majstroverko, certe estas konenda de ĉiu kulturita mondlingvano. Aliflanke, veran majstroverkon prezentas L. C. Deij per sia "Al la juda foririnto".

Kursestroj kaptu la okazon!

## Edukado en la Tria Mondo

Enketo de UNESKO pri la sumo kiun elspezas evoluantaj landoj pri eduko montras, ke en 1970 preskaŭ 3,3 procentojn de sia MNP (Malneta Nacia Produkto) ili uzis pri instruo, eduko de instruistoj, kaj simile. La ciferoj, kiuj rilatas al tri kvaronoj de la Ŝtatoj-Membroj de UNESKO en la "Tria Mondo", montras ke la prieduka elspezo en Afriko estas 4,3 procentoj de la MNP, en Azio 3,6, kaj en Latin-Ameriko 3,2. Kompare kun la ciferoj por 1967, tiuj por 1970 montras altiĝon de preskaŭ duona procento en la prieduka elspezo.

(Unesko-Novajoj, UEA)

Ĉina Esperanta monata gazeto

# EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1974

### Abonprezo:

1 jaro US \$ 2.20  
2 jaroj US \$ 3.30  
3 jaroj US \$ 4.40

Abonu ĉe: Esperanto-Informcentro  
P.O. Box 508  
Burlingame, CA 94010

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,  
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno akirebla senpage



## Por aktualigi la informadon

Jen prezoj por pograndaĵoj de la anglalingva sekcio de ELNA Newsletter. Estas la celo de tiu sekcio ne nur informi la membraron, sed ankaŭ—eble pli grave—informi la generalan publikon pri Esperantaj aktualizaĵoj.

Estus utile al la redaktoro, se oni mendus antaŭ aperigo de la koncerna numero, tiel ebligante al li mendi konvenan kvanton ĉe la presisto. Ni sugestas, ke ĉiu klubo, kiu regule plenumas sian devon de informado, faru konstantan mendon de eble cent ekzempleroj de ĉiu numero.

10 ekzempleroj	\$ 1,50
20	2,00
50	4,00
100	6,00
200	10,00

Abonojn al ĉiuj esperantaj periodaĵoj de la mondo peras la Esperanta Lingva Serva Kompanio, 3318 N. Lake Shore Drive, #801, Chicago, IL 60657. Sendu afrankitan koverton por prezlisto de 78 gazetoj el 26 landoj.



## Kanado kongresos

La 16a Kanada Kongreso de Esperanto lokiĝos en la ĉefurbo de nia norda najbaro, Otavo, de la 28a ĝis la 30a de junio 1974.

Tiuj, kiuj deziras ankoraŭ fari ion esperantan post la fino de la 22a Kongreso de ELNA sed antaŭ la komenco de la 59a Universala Kongreso en Hamburgo, skribu senprokraste al la sekretariino de la Kongresa Komitato, Merle Haltrecht-Matte, 22 Glencairn Avenue, Ottawa, K1S 1M6, Kanado.

## Eduko de gastlaboristoj

La aŭstra registaro establis centran kunordigan oficejon en la Ministerio pri Eduko por trakti pri la eduko de la infanoj de gastlaboristoj.

Laŭ studo farita de la Ministerio, preskaŭ 3 500 tiaj infanoj frekventis lernejon dum la lasta lerneja jaro. Spertuloj tamen kalkulas, ke egala nombro da fremdaj infanoj ricevas nenian edukon.

(Unesko-Novaĵoj, UEA)

## Kimra junularo salutas

De la Junularo de Kimrujo ELNA ricevis ties 53an Bonvolmesaĝon al la Junularo de la Mondo por Bonvoltago (Dydd Ewyllys Da), la 18a de majo 1974. La kimroj, popolo kunte mallarge disvastigita kelta lingvo, bone konscias la mondan lingvo-problemon, kaj sekve eldonis sian Bonvolmesaĝon en dek kvin lingvoj, inkluzive Esperanton. Jen partoj de la teksto:

"Je ĉi tiu Bonvoltago, ni alvokas la junularon de ĉiuj landoj unuiĝi kun ni, por certigi por ĉiu homo sanan kaj abundan vivon....

"Hodiaŭ, ankaŭ ni havas revon, —revon kiu antaŭvidas la tempon, kiam la sanuloj helpas la malsanulojn, la riĉuloj disdonas al la malriĉuloj, kaj la fortuloj subtenos la malfortulojn. Junularo de la mondo, ni taksu abnegacion pli alte ol avarecon. Ni respondu al la alvoko kaj dediĉu nin, entuziasme kaj energie, al la atingo de abunda vivo por la tuta homaro."

### Buĝeto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, 1974

<u>ENSPEZOJ:</u>	<u>Kotizoj 1974:</u>	800 x \$10,00 =	\$ 8 000	
	<u>Restaĵo de 1973:</u>		7 300	
			<u>\$15 300</u>	
<u>ELSPEZOJ:</u>	<u>Oficejo:</u>	<u>monate</u>	<u>jare</u>	
	Luado	\$150	\$ 1 800	
	Salajro	700	8 400	
	Funkciado kaj ekipo	<u>100</u>	<u>1 200</u>	
		\$950	\$11 400	\$11 400
	<u>Eldonaĵoj:</u>	ELNA Newsletter: 6 x \$300 =	\$1 800	
	Jarkajero:		<u>600</u>	
			\$2 400	2 400
	<u>Informado:</u>	Budoj, disdonaĵoj:		1 000
	<u>Estrarar:</u>	Telefonado ktp.:		<u>500</u>
				\$15 300

BEZONO: Jara enspezo de \$15 000 minimume. Ĝis ni havos 1 500 membrojn, ni bezonos kontribuojn. Eĉ \$15 000 nur daŭrigos kun unu stabano en oficejo, kaj ni esperas pligrandigi la aferon.

E. James Lieberman, M. D.  
Prezidanto, ELNA

## Konciza Gvidilo tra Usona Esperantujo

1. Estraro de ELNA (kun lasta deĵorjaro)
  - A. Prezidanto
 

D-ro E. James Lieberman (1975)  
6451 Barnaby Street N. W.  
Washington, DC 20015
  - B. Vicprezidanto
 

S-ino Catherine L. Schulze (1975)  
410 Darrell Road  
Hillsborough, CA 94010
  - C. Sekretario
 

S-ro Robert E. Bailey (1974)  
147 Birch Street, #4  
Redwood City, CA 94062
  - Ĉ. Kasisto
 

S-ino Peggy Linker (1976)  
1414 Monroe Street  
Walla Walla, WA 99362
  - D. Estrarestro
 

S-ro Francis E. Helmuth (1975)  
2448 Sagebrush Court  
La Jolla, CA 92037
  - E. Ceteraj Estraranoj
 

S-ro Allan Boschen (1974)  
195 Partridge Road  
Pittsfield, MA 01201

S-ro William R. Harmon (1974)  
3-54-10 Sendagaya  
Shibuya-ku  
Tôkyô T 151  
JAPANUJO

S-ro Ken Thomson (1974)  
1802 Edgehill  
Pasadena, TX 77502

D-ro John L. Lewine (1975)  
West Stockbridge, MA 01266

S-ino Doris Vallon (1975)  
700 Nina Lane  
Foster City, CA 94404

S-ro Albert Estling (1976)  
1351 Grant Street  
Walla Walla, WA 99362

S-ro R. Kent Jones (1976)  
3318 N. Lake Shore Drive, #801  
Chicago, IL 60657

Charles R. L. Power (1976)  
P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010
2. Komisiitoj de ELNA
  - A. Arkivo
 

D-ro B. J. Balcar  
62 Via Castanada  
Monterey, CA 93940
  - B. Aŭd-Vida Sekcio
 

S-ro H. Ken Ver Ploeg  
321 E. 19th Avenue  
Spokane, WA 99203
  - C. Koresponda Servo
 

F-ino Ellen A. Lewis  
15 Salisbury Road  
Brookline, MA 02146
3. Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
  - A. Prezidanto
 

D-ro John L. Lewine  
West Stockbridge, MA 01266
  - B. Eduka Sekretario
 

S-ro William Simpson  
2215 Walnut Street  
Harrisburg, PA 17103
  - C. Koresponda Sekretario
 

S-ro Lewis Cook, Jr.  
Box 422  
Circleville, OH 43113
  - Ĉ. Kasisto
 

S-ro John H. Fulton  
P. O. Box 742  
Yucaipa, CA 92399
  - D. Redaktoro, AAIE-Bulteno

S-ino Dorothy Holland  
5140 San Lorenzo Drive  
Santa Barbara, CA 93111
4. Ĉefdelegito de Usono
 

S-ro Armin Doneis  
P. O. Box 105  
Pharr, TX 78577
5. UEA-Komitatano por ELNA
 

S-ro William H. Schulze  
410 Darrell Road  
Hillsborough, CA 94010

## Auld proponas tradukkurson

Se sufiĉe da studentoj sin anoncos, William Auld pretas instrui specialan kurson pri la tradukarto ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato ĉi-somere. Diskutoj pri tradukproblemoj ofte okazas en kadro de la supera kurso, sed por tiuj, kiujn vere interesas la temo, tio ne ĉiam tute sufiĉas. La proponata speciala kurso kunvenus trifoje semajne.

Malgraŭ la artikolo en nia lasta numero, s-ro Auld restos dum la tuta tri-semajna periodo anstataŭ iri al Hamburgo. La Bulgara Esperanto-Teatro ne povos, pro financaj kialoj, ludi lian tradukon el Ŝekspiro Epifanio, do s-ro Auld decidis ne forlasi sian amatan San-Franciskon pli frue ol necese.

Kiel ni anoncis en la lasta numero, Duncan Charters instruos mezgradan kaj instrumentodan kursojn.

Ni invitas tiujn, kiuj interesiĝas pri la san-franciska kursaro, kaj aparte pri la proponata tradukkurso, kontakti la Centran Oficejon por pliaj informoj.

## Aperos baldaŭ....

La maja-junia numero de Newsletter enhavos resumprezentadon de la komitataj raportoj akceptitaj ĉe la 21a Kongreso de ELNA en Ĉikago.

## Ni funebras

James Gibson, longtempa fidela membro kaj subtenanto de ELNA, mortis la 5an de aprilo 1974 en Palo Alto, Kalifornio. Ni kondolencas s-inon Ella Gibson kaj ĉiujn aliajn forlasitojn.

## ANONCETOJ

Volas korespondi f-ino Harujo Ono, 1-11-16 Izumi Sugiama, Tôkyô, Japanio. 22-jara studentino pri angla kaj usona literaturo. Ŝatas legi, ludi pianon kaj aŭskulti muzikon. Aktiva Esperantistino.

S-ino Maria Telbizova, Str. Gurko No. 20, Pažadzhik, Bulgario, interesiĝas pri "via loĝloko, via profesio, viaj interesoj." 38-jara instruistino, filatelistino.

S-ro Julio Schalk, scienca kunlaboranto de la Urania Astronomia Observatorio, H. 1475, Budapest 10, P. O. Box 49, Hungario, deziras interŝangi astronomiajn materialojn kaj esperantaĵojn kun usonano.

S-ro Luis Fernando Martínez Solís (Ludoviko Samideano), Poŝtkesto 6950, Mendellin, Kolombio, volas korespondi kun la tuta mondo.

S-ro Mieczyslaw Porowski, 45-774 Opole, ul. Dambonia 133/15, Pollando, 27-jara, volas korespondi pri turismo, sporto, muziko, literaturo, kaj interŝangi poŝtmarkojn, gramofondiskojn, bildkartojn.

Informojn pri Sennaciismo kaj Sennacieca Asocio Tutmonda sendas la Landa Peranto de la Sennaciista Frakcio, Karl Pov, 215 Second Avenue, ĉambro 206, San Mateo, CA 94401.

La Libroservo faras du petojn: ke oni ne plendu pri nericevo de la romano Nuda inter lupoj ĝis julio, ĉar laŭŝajne la Libroservo ne ricevos stokon ĝis junio, kaj ke oni mendu kongresajn glumarkojn ne de la Libroservo, sed de la Ĉefdelegito de Usono, s-ro Armin Doneis (vd. p. E-6).

## ELNA-VOĈDONADO 1974

## KANDIDATO POR SEKRETARIO

ROBERT E. BAILEY, Redwood City, CA. Ekstudis Esperanton en 1962. Kasisto, 1964-1967. Sekretario, 1971-1974. Preferoj: vojaĝoj, konatigoj kaj amikeco.

Metu ikson (x) en la kvadraton apud la nomo de ĉiu kandidato, por kiu vi voĉdonas. Nur tiuj kvar iksoj (tri por estraranoj, unu por sekretario) estu skribitaj sur la balotilo. Nepre ne indiku vian nomon. Poste detranĉu la balotilon kaj metu ĝin en blankan (senindikan) koverton. Fermu tiun koverton kaj metu ĝin en duan koverton, sur kiu nepre aperu via nomo kiel sendinto kaj la vorto "balotilo". Sendu ĝin al s-ro Robert E. Bailey, Sekretario de ELNA, 147 Birch Street, #4, Redwood City, CA 94062. Aliaj komunikaĵoj ne estu metitaj kun la balotilo. Nur membroj de ELNA kotizintaj por 1974 rajtas voĉdoni. Ĉiu balotilo devas atingi la Sekretarion antaŭ la 21a de junio.

## KANDIDATOJ POR ESTRARANO

ALLAN C. BOSCHEN, Pittsfield, MA. Instruisto ĉe Hoosac Valley High School. Instruas tie Esperanton. Parolis al multaj grupoj pri Esperanto. Ĉeestis kvar Universalajn Kongresojn. Prezidanto de Berkshire Esperanto-Societo, Delegito de UEA, membro de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto kaj Asocio por Nuntempaj Lingvoj (MLA). Instruis kaj varbis televide kaj radie.

BRIAN NEIL BURG, Huntington Beach, CA. 25-jara fraŭlo, diplomito pri psikologio, nun studas teknikan desegnadon. Esp-iĝis laŭgrade dum dek jaroj, aktivis precipe dum lastaj du-tri. Semas konstante per informado, instruado, donacoj al bibliotekoj, deĵorado ĉe ekspozicioj, varbado de junaj voluptaj inoj, de kiuj la movado certe ne suferus. Kredas, ke necesas por ELNA plibonigitaj publikaj rilatoj, ĉar Usono estas vere la ŝlosilo al tutmonda akcepto. Verkas kaj tradukas esperante.

GERALD CIRRINCIONE, Boston, MA. 27-jara redaktisto. Lernis la lingvon en 1971. UEA-Vicdelegito. Helpis organizi grupon de samideanoj de la Bostona regiono. Ĉeestis la Portlandan UK-on. Opinions, ke la plej grava tasko de ELNA estas la penetrigo de Esperanto en la publikan lernejon, la ordinaran librovendejon kaj la municipan bibliotekon.

ARMIN DONEIS, Pharr, TX. 68-jara emerita inĝeniero, lernis Esp-on en 1927. Eksprezidanto kaj eksestrarestro de ELNA. Aktive partoprenis almenaŭ dek ELNA-Kongresojn. Instruis laŭ Ĉe-metodo. Vojaĝis en 14 landoj dufoje. Nuna Ĉefdelegito de UEA por Usono. Laboris por ELNA dum 15 jaroj.

JOHN FUTRAN, New York, NY. Naskiĝis 1892. UEA-Delegito de 1925 ĝis nun. N-ro 20 en la fondado de ELNA. Ekskasisto de ELNA, librozorgisto ĉe la Nov-Jorka Informcentro. Ankoraŭ vivplena kaj aktiva en la Esperanto-Societo de Nov-Jorko.

BERNICE GARRETT, Manhattan Beach, CA. 49-jara psikologo. Lernis Esperanton post la tragedio ĉe la Olimpiaj ludoj en Munkeno, 1972. Kondukas Esperanto-Klubon de Sudgolfeto kaj propagandas multe por Esperanto, precipe per ekspozicioj. Kredas, ke ELNA devas serĉi kontribuojn por nacia reklamo, inter aliaj aferoj. Jam komencis studi pri eblaj monfontoj.

KEN THOMSON, Pasadena, TX. 35-jara konsultisto pri elektronikaj sistemoj. Lernis Esperanton en 1967. Usona peranto de Internacia Scienca Asocio Esperantista. Aktive partoprenis ĉiujn ELNA-Kongresojn ekde 1968, kaj la Universalajn Kongresojn de la pasintaj tri jaroj. Firme opinions, ke ELNA nepre devas okazigi tutlandan kongreson ĉiujare, prefere en loko kie troviĝas malmultekosta loĝado, pro la alta valoro de la kulturaj kaj personaj interŝanĝoj.

Voĉdonu por tri estraranoj. Balotiloj kun pli ol tri voĉdonoj por estrarano estos rigardataj kiel nevalidaj.

- Allan C. Boschen
- Brian Neil Burg
- Gerald Cirrincione
- Armin Doneis
- John Futran
- Bernice Garrett
- Ken Thomson

Voĉdonu por unu sekretario. Balotiloj kun pli ol unu voĉdono por sekretario estos rigardataj kiel nevalidaj.

- Robert E. Bailey
- \_\_\_\_\_

Bonvolu vidi la dorsan flankon por instrukcioj pri ensendo de ĉi tiu balotilo. Nepre ensendu kiel eble plej baldaŭ. Dankon!

# Spokane Progress Report

The 22nd Congress of the Esperanto League for North America will take place in Spokane, Washington, from the 21st to the 23rd of June 1974.

We are most fortunate in having the cooperation and use of the facilities of Whitworth College, with its lovely buildings and beautiful campus. Its President, Dr. E. Lindman, hopes to participate in the Congress as, we hope, will many others of the faculty. We look forward to a most active public meeting Saturday afternoon. We will be using the information media to inform and invite all teachers to attend, with a particular emphasis on language teachers.

Mayor David Rodgers has promised to greet the Saturday morning session if his schedule permits. Miss Spokane will greet us and will also take part in our banquet Saturday evening.

Inquiries on the Congress have come in from several foreign countries as the result of an advertisement in Heroldo de Esperanto. A few registrations have come in from Canada.

The scheduled program includes presentations from Elwyn C. Pollock, James Deer, and Roan Orloff Stone. Topics and additional speakers will be announced in the next issue.

Please remember to use the golden application mailed with the financial campaign letter, not the application which appeared in the last issue of ELNA Newsletter. An explanation appears on p. E-1 of the Esperanto section. Additional copies of the golden application can be obtained from the Central Office.

# MLA Section to Discuss American Anthology

Dr. Margaret Hagler, author of the most extensive treatment of Esperanto literature available in English, The Esperanto Language as a Literary Medium (1971), has announced the theme of the Esperanto Literature Section of this year's meeting of the Modern Languages Association, to take place in New York City, 27-30 December 1974: "What Works Should Be Included in an Esperanto Anthology of American Literature?"

Scholars are asked to submit papers of 1500-2500 words (5-10 pages) or one-page outlines of projected papers before 10 May 1974. One paper, "Poetry in the Projected Anthology of American Literature", by Scottish Esperantist William Auld, has already been accepted.

It is hoped that the meeting will be a contribution to the preparation of the planned Usona Antologio, an anthology of U. S. literature which would join a long line of anthologies of national literatures in Esperanto, from Sweden, England, Belgium, Czechoslovakia, Brazil, Switzerland, Hungary, Japan, and China.

For further information, write to Professor Margaret Hagler, Humanities Division, Lincoln Land Community College, Springfield, IL 62703.

It is possible that a few members who joined in the course of the last year did not receive Humphrey Tonkin's Esperanto and International Language Problems: A Research Bibliography or the Adresaro (Directory) of ELNA. If you are among these members, please send a postcard indicating the items missing to the Central Office of ELNA.

ELNA, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010

Please enroll me in the Esperanto League for North America. I enclose \$10 annual dues.  New membership  Renewal

I am enclosing a tax-deductible contribution to ELNA in the amount of \$ \_\_\_\_\_.

NAME \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY \_\_\_\_\_ STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

The Esperanto League for North America is a non-profit organization dedicated to spreading the use of Esperanto, the international language, and thereby advancing friendly relations among all the peoples of the world. Members receive a bimonthly Newsletter and an annual anthology of original Esperanto works. New members get bonus international Esperanto newspaper Heroldo (\$10 value, 18/year). All donations are tax-deductible. Information on bequests and gifts of stock or bonds will be provided upon request.

## Science Courses at Liège

The second session of the Summer University Courses given in Esperanto will, like the first one, take place at the University of Liege, Belgium. The session will last from the 4th through the 25th of August 1974.

There will be a total of fifteen one-week courses, covering the general branches of biology, chemistry and sociolinguistics. The faculty will consist of eight professors, all qualified to instruct at a university level in their respective fields, from six countries: Argentina, Canada, Great Britain, Japan, Norway, and the United States, which will be represented by Ralph A. Lewin, internationally known among Esperantists not only as marine biologist, but also as co-translator of Winnie-the-Pooh!

Specific topics will include ecology, algae, asexual reproduction in the animal kingdom, electrolytes, pigmentation biochemistry, new types of food (from the so-called soyburger to micro-organisms in oil), vari-linguistic research, and the elements of Esperanto sociolinguistics.

The last Summer University Courses, held in 1972, were participated by over sixty students from seventeen countries. Its record of success will probably mean a much greater attendance this year. To aid in reaching that goal, scholarships totalling 38,000 Belgian francs have been made available.

In addition to the lessons, there will be a program of field trips, sports, films, and various other activities.

### ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA

P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010  
Usono/USA



NEWS PLEASE EXPEDITE



Charters speaks, people listen! Duncan Charters will teach Esperanto with William Auld at San Francisco State University, 15 July through 2 August 1974. As an expert in teaching methods, he will give a special course on instruction of the international language. Contact ELNA for further information.

## English—International?

In October 1973 an important shipment consisting of valuable perishable biologicals for the Evandro Chagas Institute in Brazil was delayed at the air carrier's warehouse, arriving at its destination totally ruined after nine days without refrigeration "even though suitable instructions were inscribed in red ink in the English language." The consignee demanded a replacement air shipment, but "with labels in Portuguese so that instructions can be understood," and pointed out that even the clerk in charge of handling such shipments did not know the meaning of the prominently displayed word "PERISHABLE".

<p>Nonprofit Organization U.S. POSTAGE <b>PAID</b> Burlingame, CA Permit No. 296</p>
--

Address Correction Requested  
Return Postage Guaranteed